Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

STIFTUNG BSW

Numero 4 Oktobro - Decembro 2018

Rigardo translima

Blick über die Grenze



Dek jarojn aĝa estas nun la fervoja ponto trans la Oder-rivero apud Frankfurt.
(vd. paĝo 2, foto: Andre_de, WikiMedia)

Zehn Jahre alt ist jetzt die Eisenbahnbrücke über die Oder bei Frankfurt.
(s. Seite 2, Foto: Andre_de, WikiMedia)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Iun glui	3	Einen kleben	3
Mem faldi	4	Selbst falten	4
Vidigi la kaŝitojn	9	Die Verborgenen zeigen	9
„Ĉi tie estas la Karlo“	10	„Hier isch de Karl“	10
Thea Retzlaff	11	Thea Retzlaff	11
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

unu el la plej malfacilaj temoj diskutataj dum la GEFA-jarkunveno en Prerow estis inviti IFEF kaj okazigi la 72-an Internacian Fervojistan Kongreson en la jaro 2020 ĉe ni en Germanio. La propono kaŭzis kelkajn sulkigitajn fruntojn kaj zorgoplenajn vizaĝojn, sed finfine estis akceptata, ĉar regis konsento pri tio, ke la cirkonstancoj ne fariĝos pli bonaj.

Estas nia vico. La lasta en Germanio organizita IFEF-kongreso okazis en la jaro 2012 en Herzberg.

GEFA estas laŭnombre (ankoraŭ) la plej granda landa asocio de IFEF.

En la jaro 2020 troviĝas oportuna dato, ĉar la pentekostaj tagoj komenciĝos en Majo, kiu estas tradicie la monato de la fervojista kongreso kaj ĉar pentekoste la Germana Esperanto-Asocio kunvokas siajn membrojn al la sia kongreso. En tiu jaro eblos iri komune kaj dividi la organizan ŝarĝon.

IFEF kaj GEFA estas fakaj organizoj, sed pli kaj pli malfermas sin al nefervojistoj, kiuj interesiĝas pri fervojaj temoj. Komunaj aranĝoj estas paŝoj el la propra kosmo kaj intensigas la interŝanĝon kun la ekstera mondo.

La elektita kongresloko estas limproksima kaj favoras partoprenon de gastoj el la najbara lando.

Frankfurt (Oder) kaj Słubice estas du urboj kun komunaj radikoj. Post aliĝo de Pollando al la Eŭropa Unio kaj la ĉesigo de la limkontroloj ili similas al unu komunumo kun trafluanta rivero. La pola kolegio fondita de la Viadrina Universitato de Frankfurt kaj la Adam-Mickievicz-Universitato de Poznań substrekas la pretendon de komuna limtranspaŝa esploro, instruo kaj studo.

Liebe Leserinnen und Leser,

eines der schwierigsten Themen, die auf dem GEFA-Jahrestreffen in Prerow diskutiert wurden, war die IFEF einzuladen und den 72. Interationalen Eisenbahner-Kongress im Jahr 2020 bei uns in Deutschland stattfinden zu lassen. Der Vorschlag verursachte einige gerunzelte Stirnen und sorgenvolle Gesichter, wurde aber letztlich angenommen, weil Einigkeit darin bestand, dass die Umstände sich nicht bessern werden.

Wir sind an der Reihe. Der letzte IFEF-Kongress, der in Deutschland organisiert wurde, fand im Jar 2012 in Herzberg statt.

GEFA ist zahlenmäßig (noch) der stärkste Landesverband der IFEF.

Im Jahr 2020 findet sich ein günstiges Datum, weil die Pfingsttage im Mai beginnen, der traditionell der Monat des Eisenbahnerkongresses ist und weil über Pfingsten der Deutsche Esperanto-Bund seine Mitglieder zu seinem Kongress zusammenruft. In diesem Jahr wird es möglich sein zusammenzugehen und die Last der Organisation zu teilen.

IFEF und GEFA sind fachliche Organisationen, öffnen sch aber mehr und mehr auch den Nichteisenbahnern, die sich für Eisenbahnthemen interessieren. Gemeinsame Veranstaltungen sind Schritte aus dem eigenen Kosmos und intensivieren den Austausch mit der Außenwelt.

Der gewählte Kongressort ist grenznah und begünstigt die Teilnahme von Gästen aus dem Nachbarland.

Frankfurt (Oder) und Słubice sind Städte mit gemeinsamen Wurzeln. Nach Einritt Polens in die Europäische Union und der Beendigung der Grenzkontrollen erscheinen sie wie eine Kommune mit einem hindurchfließenden Fluss. Das polnische Kolleg, gegründet von der Viadrina Universität Frankfurt und der Adam-Mickievicz-Universität Poznań unterstreicht den Anspruch vom gemeinsamen grenzüberschreitenden Forschen, Lehren und Studieren.

Ambaŭ – la universitato Viadrina en okcidento kaj la pola kolegio en la oriento - ofertas dignan forumon por kongreso.
Frankfurt/Słubice ofertas la ŝancon renkontiĝi en internacia atmosfero kaj kiel mezgranda urbo la ŝancon de sufiĉa publika atento: Ambaŭ komune havas ĉirkaŭ okdekmil enloĝantojn.
La decido certe signifas multan laboron por niaj aktivuloj. Ĝi signifas ankaŭ paŝon eksteren al interesita publiko kaj internen al niaj membroj ĝis nun nur observantaj niajn aktivecojn, tamen pretaj kunagi – eble.



Guido Brandenburg

Beide - die Universität Viadrina im Westen und das Collegium Polobicum im Osten – bieten ein würdiges Forum für unseren Kongress.
Frankfurt/Słubice bietet die Gelegenheit, sich in internationaler Atmosphäre zu treffen und als mittelgroße Stadt die Gelegenheit genügender öffentlicher Aufmerksamkeit: Beide haben gemeinsam etwa achzigtausend Einwohner.
Der Beschluss bedeutet sicher viel Arbeit für unsere Aktiven. Er bedeutet aber auch einen Schritt nach außen zur interessierten Öffentlichkeit und nach innen zu unseren bisher nur beobachtenden Mitgliedern, die aber mitzumachen bereit sind – möglicherweise.

Guido Brandenburg

Iun glui

Iel malkontentaj la kunlaborantoj de la stacio Münster estis pri makulitaj pantalonoj, pri ŝmiritaj pavimo-slaboj, pri subplandumaj glufadenoj, pri multekostaj purigaj kampanjoj kaŭzataj de pasantoj, kiuj tramaĉinte sian gumon ne trovas (aŭ ne serĉas) rubujon kaj kraĉas ĝin sur la plankon apud si aŭ kaŝe gluas ĝin sub la ripozan benkon.
Kelkaj junaj kolegoj starigis malnovan biciklon en la enira halo kaj surĝin invitis glui la uzitan gumon. La ideo, kiel certe jam supozate, venas el Usono, kie tiaj „*Bubble Bikes*“ aŭ tutsim-



Eine kleben



Irgendwie unzufrieden waren die Mitarbeiter des Bahnhofs Münster mit den fleckigen Hosen, den verschmierten Bodenplatten, den Klebefäden unter den Schuhsohlen, den teuren Reinigungskampagnen, verursacht von Passanten, die nach Durchkauen ihrer Gummis keinen Mülleimer finden (oder suchen) und es neben sich auf den boden spucken oder heimlich unter die Ruhebank kleben.
Einige junge Kollegen stellten ein altes Fahrrad in die Eingangshalle und luden ein, darauf das benutzte Kaugummi zu kleben. Die Idee kommt, wie sicher schon vermutet, aus den USA, wo solche „*Bubble Bikes*“ oder ganz

plaj glu-vandoj en stacioj de subteraj fervoj estas kontinue evoluantaj artobjektoj.
La opinioj de la Münster-anoj variis. Ĉu la glubiciklo estis tiusence sukcesa kaj helpis teni la stacidomon pura, bedaŭrinde ne estas dokumentite.
Laste mi pasis tie kaj ne plu vidis ĝin.



Guido Brandenburg

einfache Klebewände in U-Bahnhöfen sich kontinuierlich entwickelnde Kunstobjekte sind.
Die Meinungen der Münsteraner waren unterschiedlich. Ob das Klebefahrrad in diesem Sinne erfolgreich war und geholfen hat, das Bahnhofsgebäude sauber zu halten, ist leider nicht dokumentiert. Kürzlich bin ich dort vorbeigekommen und habe es nicht mehr gesehen.

(trad. Brandenburg)



Piratoj antaŭ la kapera veturo
Piraten vor der Kaperfahrt

Mem faldi

Post longa somero finiĝas la ĉefa sezono. Nin alvenintojn en Prerow salutas tranĉa nordorienta vento. Kontentaj pri nia elekto ni elpakas la vintrajn vestaĵojn el niaj kofroj kaj serĉas la vojon al la strando. Dum ni paŝas el la ŝirmanta arbaro, ni vidas antaŭ ni la ŝaŭmkronitajn

Selbst falten

Nach einem langen Sommer endet die Hauptsaison. Uns Ankömmlinge begrüßt ein schneidender Nordostwind. Froh über unsere Auswahl packen wir die warmen Wintersachen aus dem Koffer und suchen den Weg zum Strand. Während wir den schützenden Wald verlassen, sehen wir vor uns die schaumge-

ondojn kaj plenigas niajn pulmojn per la pura mara aero.

La strando estas dividita en sekciojn dediĉitajn al hundoj, nudistoj, normalaj gastoj, sekcioj kun gardistoj kaj sen gardistoj. La observaj turetoj kaj sidejoj estas malplenaj, ĉar neniu kuraĝas eĉ trempi piedfingron en la akvon. Survoje al la albordiĝa ponto ni kompate observas kelkajn infanojn klopodantajn sen videbla sukceso eduki siajn kajtojn. La albordiĝa ponto perdis sian funkcion. Neniu ŝipo plu povas alkroĉi sin. Ĝi similas longan balkonon permesantan ne nur spiri apud sed ankaŭ super la akvo. Nenio estas atingebla krom la fino. Tamen la vizitantoj en longa vico pilgrimas tien kaj reen.

Reen al la hotelo ni iras tra la arbaro. La venton ni postlasis ĉe la strando. La rolon de la mevoj tie ĉi transprenas la korvoj.

Kiel jam menciite en pasinteco, la hotelo estas iama stacidomo. Laŭ la ekstera impreso tio ne estas kontestebla. Interne ĝi post zorga adapto kaj renovigo provizas agrablajn kaj bonekipitajn gastĉambrojn. La restoracion, samtempe manĝejo por la gastoj, ornamas riĉa kolekto de signaltabuloj – bonvena ekzercokampo por rememori la iam parkeritan signalo-regularon.



Individua pordo ja estas praktika geedziĝa donaco.
Eine individuelle Tür ist doch ein praktisches Hochzeitsgeschenk.

Nia trupo estas kompare malgranda. La longa kaj komplika alvojaĝo por kelkiu estis tro streĉa. Sed ni ĝojas pri iom da internacia atmosfero, kiun Snaige kaj Ladislav estas kunportintaj. Ni ĝuas ĝin

krönten Wellen und füllen unsere Lungen mit der sauberen Seeluft.

Der Strand ist aufgeteilt in Abschnitte, die den Hunden, den Nudisten und den normalen Gästen gewidmet sind, Abschnitte mit Wächtern und ohne Wächter. Die Beobachtungstürmchen und -sitze sind aber leer, weil keiner sich



Thea sur la albordiĝa ponto
Thea auf der Seebrücke

traut auch nur einen Zeh in das Wasser zu tunken. Unterwegs zur Seebrücke beobachten wir mitleidig einige Kinder, die sich ohne sichtbaren Erfolg bemühen, ihre Drachen zu erziehen. Die Seebrücke hat ihre Funktion verloren. Kein Schiff kann mehr anlegen. Sie ähnelt einem langen Balkon, der gestattet, nicht nur am Wasser zu atmen, sondern auch über dem Wasser. Nichts kann erreicht werden außer dem Ende. Trotzdem pilgern die Besucher in langer Reihe hin und zurück.

Zurück zum Hotel gehen wir durch den Wald. Den Wind haben wir am Strand zurückgelassen. Die Rolle der Möwen übernehmen hier die Krähen.

Wie schon in der Vergangenheit erwähnt, ist das Hotel ein ehemaliges Bahnhofsgebäude. Nach äußerem Eindruck ist das nicht zu verleugnen. Innen hält es nach sorgsamer Anpassung und Renovierung angenehme und gut ausgestattete Gästezimmer bereit. Das Restaurant, gleichzeitig Speiseraum für die Gäste schmückt eine reichhaltige Sammlung von Signaltafeln – ein willkommenes

ĝis la mastro staras en mantelo ĉe nia tablo.
La centro de Prerow estas relative proksima. Ĉar tamen trafikas aŭtobuso konventempe, ni elektas komforton. La majoritato akceptas la proponon viziti la hejmlandan muzeon. Finfine ni volas ekscii ion pri nia ĉirkaŭaĵo. Denove ekstere ni scias, ke la duoninsulo Fischland-Darß-Zingst havas tri nomojn, ĉar ĝi iam konsistis el tri insuloj. La unuiĝo estis merito de la marfluo. Kaj ni scias, ke al freŝaj geedzoj oni donacis pordon. Kun tiu sugesto por eventualaj okazoj ni plupromenas, ĉe la maljuna librobrokantisto aĉetas kelkajn GDR-poŝtkartojn kaj paŭzas apud la senutila albordiĝa ponto por varmigi nin per piza supo kaj frititaj fiŝoj.



„Nun fermita“ kaj bonvenon en venonta somero!
„Nu ist zu“ und willkommen nächsten Sommer!

La alternativojn tremi ĉe la bushaltejo aŭ piede spiti la malvarmon ni ne longe diskutas.
La hotela restoracio rolas kiel nia kunvenejo. En angulo ni okupas kelkajn tablojn, instalas ekranon kaj aparatojn kaj aŭskultas Ladislav. Kiel fervojisto kaj biciklisto li konas ambaŭ perspektivojn kaj trafe analizas la klopodojn de la ĉeĥa fervojo komplezi al la biciklo-pasaĝeroj.
Kaŝa rigardo al la horloĝo: Urĝas - grupfoto sur la ludoplaco, tiam ek al la haveno. Nia ŝipo devas esti ree albordiĝinta antaŭ sunsubiro.
Ni eksidas kaj elpakas la fotilojn. La misio estas ĉasi gruojn. Streĉa observado malkovras nur mevojn, anasojn, kormoranojn, ardeojn apud la vojo. La kapitano parolas konjunktive pri centoj da birdoj kaj ŝatataj lokoj en la kano-Übungsfeld, um das einmal auswendig gelernte Signalbuch zu memorieren.
Unsere Truppe ist vergleichsweise klein. Die lange und komplizierte Anreise war manchem zu anstrengend. Aber wir freuen uns über ein wenig internationale Atmosphäre, die Snaige und Ladislav mitgebracht haben. Wir genießen sie bis der Wirt im Mantel an unserem Tisch steht.
Das Zentrum von Prerow ist relativ nah. Weil aber ein Autobus zur richtigen Zeit verkehrt, wählen wir die Bequemlichkeit. Die Mehrheit nimmt den Vorschlag an, das Heimatmuseum zu besuchen. Schließlich wollen wir etwas über unser Umfeld erfahren. Wieder draußen wissen wir, dass die Halbinsel Fischland-Darß-Zingst deshalb drei Namen hat, weil sie früher aus drei Inseln bestand. Die Vereinigung war das Verdienst von Meeresströmungen. Und wir wissen, dass man frischen Eheleuten eine Tür geschenkt hat. Mit dieser Anregung für eventuelle Gelegenheiten spazieren wir weiter, kaufen beim alten Antiquar ein paar DDR-Postkarten und pausieren neben der nutzlosen Seebrücke, um uns mit Erbsensuppe und Bratfischen aufzuwärmen.
Die Alternativen, an der Bushaltestelle zu zittern oder zu Fuß der Kälte zu trotzen, diskutieren wir nicht lange.
Das Hotel-Restaurant spielt die Rolle unseres Tagungsraums. In einer Ecke besetzen wir einige Tische, bauen Leinwand und Geräte auf und hören Ladislav zu. Als Eisenbahner und Radfahrer kennt er beide Blickwinkel und analysiert treffend die Bemühungen der tschechischen Eisenbahn, ihren Fahrrad-Reisenden zu gefallen.
Ein verstohlener Blick auf die Uhr: Es eilt - Gruppenfoto auf dem Spielplatz, dann ab zum Hafen. Das Schiff muss vor Sonnenuntergang wieder angelegt haben.
Wir setzen uns und packen die Kameras aus. Die Mission ist Kraniche jagen. Angestrengtes Beobachten fördert am Weg nur Möven zutage, Enten, Kormorane, Reiher. Der Kapitän spricht im Konjunktiv über hunderte von Vögeln und beliebte Plätze in den Schilffeldern,

kampoj, kie ili renkontiĝas por danci. Tamen fine li koncedas, ke la gruoj jam delonge estas daŭrigintaj sian vojaĝon al la sudo. Li provas konsoli nin per videofilmo. Mi preferas „Mortan Onklinon“ respektive kakaon kun rumo.



Neniaj gruoj sur Misisipo
Keine Kraniche auf dem Mississippi

En la restoracio-kunvenejo la vespermanĝo flue transiras en la vesperan programon.
Sur la ekrano viciĝas mapoj, fiŝistoj, ĉastaj bankostumoj kaj ŝtormaj inundoj. Guido prilumas la historion de la eksterserva Darß-fervojo kaj la ŝancojn de ebla revivigo.
Tiam Andreas raportas pri sia (ŝvitiga) vojaĝo tra Francio kaj Hispanio ne nur al la Universala Kongreso en Lisbono.
Ni ankoraŭ ĝuas la servojn de la gastejo ĝis diskreta admono memorigas pri laborfino.
La kaleŝo estas akurata. Fakte ĝi pli estas tolkovrita ĉaro ol kaleŝo, kiun la du pezaj ĉevaloj tiras antaŭ nian hotelon. Bodo staras kun dorsosako kaj salutas la koĉeron dum ni grimpas la eskalon supren por eksidi sur la longaj benkoj. Bodo surtabligas la enhavon de sia dorsosako kaj ni laŭvice klopodas verŝi iom en la disdonitajn plastoglasetojn – malfacila afero en la senresorta ĉaro.
Snaige ricevas paketon da kvadrataj paperfolioj kaj helpe de la aldonitaj instrucioj klarigas al ni, kiel faldi ilin tiel, ke la rezulto kun iom da bona volo similu al gruo. Florojn, ranojn kaj nedifineblajn tridimensiajn objektojn ni admiras agnoske sed kritike. Tamen ne malmultaj verkoj sendube estas sukcesaj.

wo sie sich zum Tanzen treffen. Letztlich gesteht er aber ein, dass die Kraniche schon lange ihre Reise nach Süden fortgesetzt haben. Er versucht uns mit einem Video zu trösten. Ich ziehe eine „Tote Tante“ vor bzw. einen Kakao mit Rum.
Im Restaurant-Tagungsraum geht das Abendessen fließend in das Abendprogramm über. Auf der Leinwand reihen sich Landkarten, Fischer, keusche Badegewänder und Sturmfluten. Guido beleuchtet die Geschichte der stillgelegten Darß-Bahn und die Chancen einer möglichen Wiederbelebung. Dann berichtet Andreas von seiner (schweißtreibenden) Reise durch Frankreich und Spanien nicht nur zum Weltkongress nach Lissabon.
Wir genießen noch die Dienste der Gaststätte bis eine diskrete Mahnung uns an den Feierabend erinnert.
Die Kutsche ist pünktlich. Eigentlich ist sie eher ein Planwagen als eine Kutsche, den die zwei schweren Pferde vor unser Hotel ziehen. Bodo steht mit einem Rucksack und begrüßt den Kutscher während wir über die Leiter hochklettern, um uns auf die langen Bänke zu setzen. Bodo bringt den Inhalt seines Rucksacks auf den Tisch und wir bemühen uns der Reihe nach, etwas in die verteilten Plastik-Gläschen zu gießen – eine schwierige Angelegenheit in dem ungefederten Wagen.
Snaige bekommt ein Päckchen quadratischer Papierbögen und erklärt uns mithilfe der beigefügten Anweisungen, sie so zu falten, dass das Ergebnis mit etwas gutem Willen einem Kranich ähneln soll. Blumen, Frösche und undifinierbare dreidimensionale Objekte bewundern wir anerkennend aber kritisch. Trotzdem sind nicht wenige Werke zweifellos gelungen.
Den letzten Kilometer ziehen uns die Pferde über Wurzeln, durch Löcher und einen verwilderten Wald. Der Leuchtturm „Darßer Ort“ – das Ziel unseres Ausflugs - liegt in einem großen Naturschutzgebiet. Froh wieder festen Boden unter den Füßen zu haben, klettern wir den Leuchtturm hinauf und besuchen, nachdem wir uns von dort aus umgesehen haben, das benachbarte Museum, ein Haus

La lastan kilometron la ĉevaloj tiras nin trans radikoj, tra truoj kaj sovaĝa arbaro. La lumturo „Darßer Ort“ – la celo de nia ekskurso – situas en granda naturprotekta areo. Ĝojaj havi firman teron sub la piedoj ni suprengrimpas la lumturon kaj ĉirkaŭrigardinte de tie vizitas la najbaran muzeon, domon plenan da geologiaj detaloj pri la proksima kaj malproksima ĉirkaŭaĵo kaj plenan da bestoj, pri kies ekzisto ni scias, kiujn en la naturo ni tamen ne renkontas – gruon ekzemple.



Snaige instruas nin faldi gruojn.
Snaige bringt uns bei, Kraniche zu falten.

Revoje ni startas duan faldorondon. Helpon kaj sugestojn ni ricevas de niaj kunprenitaj gastoj, kiuj preferas traskuiĝi kun ni anstataŭ migri al la urbeto.

La gruo-familio dum posttagmezo kaj vespero kontinue kreskas. Faldi evidente dependigas.

Dum la GEFA-estraro estas kunsidinta laŭokaze en malgranda rondo, unu afero tamen estu diskutata inter ĉiuj ĉeestantoj: GEFA pripensas inviti IFEF kaj okazigi la 72-an Internacian Fervojistan Kongreson 2020 en Germanio. Guido prezentas la aktualajn planojn, kiuj esence antaŭvidas komunan aranĝon kun la Germana Esperanto-Asocio. Tiu antaŭvidas 2020 Frankfurt (Oder) kiel kongreslokon. Partopreno de la pola asocio estas ebla sed ne jam interkonsentita. Taŭgaj kunvenejoj kaj loĝeblecoj estas je dispono. Ni ĉiuj konscias, ke la plano signifos multan laboron. Sed entute ĝi renkontas pozitivan tendencon ĉe la ĉeestantoj.

voller geologischer Einzelheiten über die nahe und ferne Umgebung und voller Tiere, von deren Existenz wir wissen, denen wir aber in der Natur nicht begegnen – einem Kranich zum Beispiel.

Auf dem Rückweg starten wir eine zweite Faltrunde. Hilfe und Anregungen bekommen wir von unseren mitgenommenen Gästen, die es vorziehen, mit uns durchgeschüttelt zu werden statt zum Städtchen zu wandern.

Die Kranichfamilie wächst am Nachmittag und Abend stetig weiter. Falten macht offenbar süchtig.

Während der GEFA-Vorstand fallweise in kleiner Runde getagt hat, soll eine Sache allerdings unter allen Anwesenden diskutiert werden: GEFA denkt darüber nach, IFEF einzuladen und den 72. Internationalen Eisenbahner-Kongress 2020 in Deutschland stattfinden zu lassen. Guido stellt die aktuellen Planungen vor, die im Wesentlichen eine gemeinsame Veranstaltung mit dem Deutschen Esperanto-Bund vorsehen. Dieser sieht 2020 als Kongressort Frankfurt (Oder) vor. Eine Teilnahme des polnischen Verbands ist möglich aber noch nicht vereinbart. Taugliche Versammlungsräume und Wohnmöglichkeiten stehen zur Verfügung.



Ladislav iras la vojon al perfekteco.
Ladislav geht den Weg zur Perfektion.

Uns ist allen klar, dass der Plan viel Arbeit bedeuten wird. Insgesamt trifft er aber auf ein positives Echo.

Malhelas ekstere. Kelkaj el ni jam trovis siajn litojn. Kelkaj ankoraŭ sidas en malgranda rondo, gustumas likvoro-specialaĵojn kaj elprovas, ĉu kantoj de la junaĝo elvokas sentojn de junaĝo. Nu jes – iomete.
Ni disiras kiel ni estas kunvenintaj, laŭ diversaj vojoj: per aŭtomobilo, per aŭtobuso al malproksima stacio.
La vesperaj retmesaĝoj konfirmas, ke ĉiuj estas atingintaj siajn hejmojn kaj antaŭĝojas pri la sekvonta jarkunveno, pli facile atingebla, en Bad Ems.

Guido Brandenburg

Es ist dunkel draußen. Einige von uns haben schon ihre Betten gefunden. Einige sitzen noch im kleinen Kreis, probieren Likör-Spezialitäten und versuchen, ob Lieder der Jugendzeit Gefühle der Jugendzeit hervorrufen können. Nun ja - ein bisschen.
Wir gehen auseinander wie wir zusammengekommen sind, auf verschiedenen Wegen: Mit dem Auto, mit dem Bus zu einem fernen Bahnhof.



Die eMails am Abend bestätigen, dass alle ihre Heimatorte erreicht haben und sich auf das folgende Jahrestreffen freuen, leichter zu erreichen, in Bad Ems.

(trad. Brandenburg)



02.05.1933 SA-trupoj okupas la sindikatan domon ĉe Engelufer en Berlin.
02.05.1933 besetzen SA-Truppen das Gewerkschaftshaus am Berliner Engelufer.
(Foto Deutsches Historisches Museum)

Vidigi la kaŝitojn

Antaŭ realigi siajn krudajn planojn pri ekstermo de „malutilaj“ kaj „malamikaj“ elementoj

Die Verborgenen zeigen

Vor Umsetzen seiner kruden Pläne zur Ausrottung „schädlicher“ und „feindlicher“ Elemente

la nazia reĝimo rigore eliminis siajn kontraŭulojn – komunistojn, socialdemokratojn, sindikatanojn, opoziciajn organojn – unue la organizajn strukturojn, tiam la unuopulojn.
La fervojista sindikato EVG decidis instali memorigan lokon en sia centra administracio en Berlin, kiu revoku la biografiojn de ordinaraj fervojistoj, kiuj suferis persekuton pro sia opozicio kontraŭnazia aŭ pro raso-ideologiaj kaŭzoj.
Centro de la aranĝaĵo estos ekrano per kiu eblas elekti kaj vidigi biografiajn materialojn kaj dokumentojn pri komence 150 personoj, personoj kiel Karl Kahn kaj Alfred Mode, ambaŭ judoj kaj fervojaj kuracistoj, ambaŭ pelitaj ĝis morto, aŭ Herbert Gollnow, inspektoro ĉe Deutsche Reichsbahn, 1943 murdita pro membreco en la rezista grupo „*Rote Kapelle*“.
La preparoj ankoraŭ daŭras. La iniciatinto Peter Lind esperas inaŭguron la 2-an de Majo 2019, 86 jarojn post la atako kontraŭ la sindikataj domoj.

Guido Brandenburg

elminierte das Nazi-Regime rigoros seine Gegner – Kommunisten, Sozialdemokraten, Gewerkschafter, oppositionelle Organe – erst die organisatorischen strukturen, dann die Einzelnen.
Die Eisenbahnergewerkschaft EVG hat beschlossen, in seiner Zentrale in Berlin einen Erinnerungsort zu schaffen, der die Biografien von Eisenbahnern in das Gedächtnis zurückrufen soll, die wegen ihrer Opposition gegen die Nazis oder aus rassenideologischen Gründen Verfolgung erlitten haben.
Mittelpunkt des Arrangements wird ein Bildschirm sein, mit dem man biografisches Material und Dokumente auswählen und zeigen kann, von anfänglich 150 Personen, Personen wie Karl Kahn und Alfred Mode, beide Juden und Bahnärzte, beide in den Tod getrieben, oder Herbert Gollnow, Inspektor bei der Deutschen Reichsbahn, 1943 ermordet wegen seiner Mitgliedschaft in der Widerstandsgruppe „Rote Kapelle“
Die Vorbereitungen dauern noch an. Der Initiator Peter Lind hofft auf eine Eröffnung am 2. Mai 2019, 86 Jahre nach dem Angriff auf die Gewerkschaftshäuser.

(trad. Brandenburg)

„Ĉi tie estas la Karlo“



La telefonaj konversacioj kutime daŭris iom pli longe. Sed se Karlo alvokis, li havis ion klarigendan. Komence temis pri antaŭelspezoj, konfirmoj, membronombroj, kontonotoj, anoncoj al la federacio. Karlo estis konscienca kasisto.

„Hier isch de Karl“

Die Telefonate dauerten meist etwas länger. Aber wenn Karl Bernhard anrief, hatte er etwas zu klären. Anfangs ging es um Auslagen, Bestätigungen, Mitgliederzahlen, Buchungen, Meldungen an die Föderation. Karl war ein gewissenhafter Kassenführer.
War das geregelt, genügten meist ein paar Stichworte und er erzählte, über die Landverschickung, Schwarzwälder Nachbarschaften, Jugendfreund(inn)en, über die Untiefen des Badischen vom „Wunderfitz“, über den „Nieselpriem“ zum „Lumpeseggel“ und über die Pärchenbildung bei IFEF-Kongressen. Karl hatte ein erstaunliches Gedächtnis und konnte sehr farbig berichten. Worum es am Anfang

Kiam tio estis regulita, kutime sufiĉis kelkaj kapvortoj kaj li rakontis, pri la protektotransportado, nigra-arbaraj najbaroj, amik(in)oj, pri la malprofundoj de la badenia dialekto de scivolemulo preter grumblemulo al kanajlo kaj pri la pariĝo dum IFEF-kongresoj. Karlo havis mirigan memorkapablon kaj povis tre kolore raporti. Pri kio temis je la komenco de la konversacio, mi estis notinta. Alie mi tion estus forgesinta.

Karlo apertenis al la generacio de miaj gepatroj kaj preskaŭ samtempe venis al Esperanto, lia unua fremdlingvo, kies taŭgecon li jam en la unua jaro dum la IFEF-kongreso en Lindau povis elprovi. La sukceso estis konvinka kaj instigis lin daŭrigi sian tutan vivon, vojaĝi, inviti gastoj, renkonti amikojn en grandaj kaj malgrandaj aranĝoj. Per anekdotoj pri siaj renkontoj li povis plenigi vesperojn.

Karlo engaĝiĝis en Esperanto-asocioj kaj tie helpis kie li povis. Unuavice li estis aplikanto. Ĉiam denove li estis emfazinta, ke la lingvo vastigis lian horizonton kaj ofertis al li eblecojn, kiujn li alikaze ne estus havinta. Li ekspluatis ilin laŭ siaj fortoj ankaŭ jam sciante ke la malsano ne plu lasos al li multe da tempo.

Li ĝustatempe konfidis al ni sian staton, regulis regulendan – konscience kiel ni tion konis ĉe li. Kaj li ankoraŭ donis al ni okazon adiaŭi.

Ni estas dankaj esti konintaj lin.

Guido Brandenburg

des Telefonats ging, hatte ich mir notiert. Sonst hätte ich das vergessen.

Karl gehörte zur Generation meiner Eltern und kam fast zeitgleich zum Esperanto, seiner ersten Fremdsprache, die er im ersten Jahr auf dem IFEF-Kongress in Lindau bereits auf Tauglichkeit erproben konnte. Der Erfolg war überzeugend und ließ ihn sein ganzes Leben dabeibleiben, reisen, Gäste einladen, Freunde treffen auf großen und kleinen Veranstaltungen. Mit Anekdoten über seine Begegnungen konnte er Abende füllen.

Karl engagierte sich in den Esperanto-Verbänden und half dort wo er konnte. In erster Linie war er aber Anwender. Er hatte immer wieder betont, dass die Sprache seinen Horizont erweiterte und ihm Möglichkeiten bot, die er sonst nicht gehabt hätte. Er nutzte sie nach Kräften auch als er schon wusste, dass seine Krankheit ihm nicht mehr viel Zeit lassen würde.

Er weihte uns rechtzeitig in seinen Zustand ein, regelte, was zu regeln war - gewissenhaft wie wir es von ihm kannten. Und er gab uns noch Gelegenheit, uns zu verabschieden.

Wir sind dankbar ihn gekannt zu haben.

(trad. Brandenburg

Thea Retzlaff

La mesaĝon pri ŝia subita morto ni aŭdis nekredante.

Thea Retzlaff estis prizorginta kaj fleginta Manfred, kiun apopleksio estis kateninta al la lito. Manfred la 1-an de Junio ne revekiĝis post operacio.

Ŝi estis ordiganta lian heredaĵon, povis dediĉi sin al la genepoj, reanonci sin ĉe malnovaj geamikoj, sekvi proprajn interesojn. Ĉion por eĉ ne duona jaro?

Thea Retzlaff

Die Nachricht von ihrem plötzlichen Tod haben wir mit Unglauben gehört.

Thea Retzlaff hatte Manfred versorgt und gepflegt, den ein Schlaganfall an's Bett gefesselt hatte. Manfred war am 1. Juni nach einer Operation nicht mehr aufgewacht.

Sie war dabei, seinen Nachlass zu regeln, konnte sich ihren Enkeln zuwenden, sich bei alten Freunden zurückmelden, eigenen Interessen nachgehen. Alles nur für nicht einmal ein halbes Jahr?

Ni rememoras pri la komunaj tagoj dum la jarkunveno en Prerow kun Thea enmeze – praktika, interesita, agema, atenta kiel konversacia partnerino, kiu akceptis la homojn kiaj ili estas,



iomete ankaŭ kiel espero por ni, kiuj ja ĉiam serĉas homojn, kiuj kunagas. Tio ĵus estis antaŭ unu semajno.
Disrompiĝis la ekspekto pri kontentiga viva vespero same kiel la sonĝoj sin didiĉi al gefiloj kaj genepoj. Tiom multe ankoraŭ estintus ebla.
Malfacilas tie ekkoni sencon.
Ni pensas pri ŝia familio, kiu dum malmultaj monatoj perdis ambaŭ gepatrojn kaj geavojn.

Guido Brandenburg

Wir erinnern uns an die gemeinsamen Tage auf dem Jahrestreffen in Prerow mit Thea mittendrin – praktisch, interessiert, unternehmungslustig, aufmerksam als Gesprächspartnerin, die die Menschen nahm wie sie sind, ein bisschen auch als Hoffnungsträgerin für uns, die ja immer nach Menschen suchen, die mitmachen.
Das war vor gerade einmal eine Woche zuvor. Die Erwartung auf einen erfüllten Lebensabend sind zerbrochen wie die Träume, für ihre Kinder und Enkel da zu sein. Da wäre noch so viel möglich gewesen.
Es fällt schwer darin einen Sinn zu erkennen. Wir denken an ihre Familie, die innerhalb weniger Monate beide Eltern und Großeltern verloren haben.

(trad. Brandenburg)



Redaktofino por FE 01/2019 estos la 15.02.2019		Redaktionschluss für FE 01/2019 ist 15.02.2019	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Karl Bernhard GEFA	Name	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12